

ESPERANTO

★ TRIUMFANTA ★

N-ro 5 * 12. Sept. 1920

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

Eliras provizore dufoje en la monato;
depost Novembro 1920 ĉiusemajne.

Nia Dekdua (8.-15. Aug.)



La Deleĝitoj de la XII-a.



La Kongresanoj antaŭ la Paapalaco.

Fine, post ses jaroj, la Esperantistaro povis sekvi la kunvokon al nova intervido, interparolo, interkonsento Kun malpacienca turo estis atendita kaj la 3-a de Aŭgusto 1920 efektiviĝis la deziro de ĉiuj veraj Esperantistoj. Hago, la bela reĝinlanda urbo, estis elektita akcepti kaj gastigi ilin kaj en tio ĝi tre bone sukcesis.

Sabato.

Sabaton, en la Akceptejo, la kongresanoj ricevis sian koverton, entenantan: kartonon kongresinsignon, kvarpaĝan „Kongresa Bulteno“ (sola n-ro, enhavanta bonvenon, kongres-programon, liston de restoracioj kaj diversajn informojn), belan ilustritan gvidlibron tra Hago k. a. Estis enskribitaj 399 gekongresanoj, la pliparto el Britio. Konsiderante la karecon de la lando — la plej kara en Eŭropo — kaj la alteco de la Holanda valuto, tiu nombro estas sufiĉe granda. La akceptejo, lokita en la knabina lernejo Bleijenburg, estis verde ornamita kaj entenis kiel kutime Babilejon provizitan per senpaga skribpapiro kaj poŝtkartoj, krome poŝtoŝtifejon, monŝanĝejon, la ekspozicion kaj vendejon de Esperantaj kaj mangajtoj. Tie dum liberaj horoj la kongresanoj ĉiam povis travivi agrablajn minutojn kun diversnaciaj samideanoj.

Dimanĉo.

Dimanĉon tagmeze (la unuan kongrestagon) kolektiĝis la protestantaj kaj inter ili ankaŭ alifunkciaj gesamideanoj al *Esperanta Diservo*, gvidata de Holanda pastro S-ro R. W. F. Kyffienbelf ius reveninta el la Malajaj insuloj, kie li loĝis dum 30 jaroj. Li estis helpata de S-ro W. M. Page el Edinburgo kaj S-ro Päätilä el Finnlando. F-ino Palm aŭdigis bevoĉajn kantojn akompanatajn de violonĉelo kaj orgeno, kio grandigis la solenecon de tiu ĉi horo.

Posttagmeze je la tria horo malfermiĝis la pordo de la malnova *Kavalira Salonego* (Ridderzaal) por la akcepto de la Esperantistaro kaj *Solena Malfermo* de ĝia XII-a. Sur la estrado ni vidis jam de longe konatajn personojn kiel S-ron Warden, D-ron Privat, ing. Isbrücker, D-ron Mees, S-rojn Deligny, Stettler, Brujin kaj S-inon Cense. Malantaŭ ili, kvazaŭ ŝirmanta supera prezidanto, staris la busto de nia kara Majstro, donacita al la kongreso de S-ro Maske-frato. Estis sentata la foresto de D-ro Zamenhof, sed spirite li certe ĉeestis. Antaŭ la estrado ĉe ambaŭ flankoj estis la seĝoj por la deleĝitoj kaj post tiuj la lokoj por la ceteraj kongresanoj. En la mezo troviĝis tablo plene okupita de konataj ĵurnalistoj de Esperantujo kaj de Hagaj gazetoj, kiuj por tiu ĉi grava tago lernis Esperanton, kies komprenon ili montris per ĉiutagaj detalaj raportoj en Holandaj ĵurnaloj. Entute preskaŭ 400 Esperantistoj plenigis la salondon, kie ĉiujare la Nederlanda reĝino malfermas la Parlamenton. Alta salono el malnovaj tempoj, la muroj kovritaj per diverskoloraj tapiŝoj,

la lustroj simplaj kiel la tuta internajo — sed precipe pro tio io aparta — kaj en la koloraj fenestroj estas videblaj la blazonoj de la diversaj Nederlandaj graflandoj kaj provincoj.

S-ro Warden kiel anstataŭanto de Generalo Sébert, prez. de la KKK, malfermis per mallongaj vortoj la kongreson kaj transdonis la prezidon al S-ro Isbrücker el Hago, prez. de la Loka Kongres-Komitato, kiu estis aklande akceptata kiel prezidanto de la XII-a. S-ro Warden el Skotlando estis elektata kiel vicprezidanto kaj S-ro Deligny el Francio kiel sekretario. La honorprezidon akceptis la urbestro de Hago, S-ro Patijn, kaj estis elektata ankaŭ Generalo Sébert kiel honora prezidanto.

Post tio S-ro Isbrücker dankis, promesante plenumi ĉion, kion postulas tia ofico. Lia tre aplaudita Esperanta parolado estos presata en la Oficiala Dokumentaro. Li daŭrigis en Nederlanda lingvo sin turnante al la urbestro. Tiu ĉi respondis same, esprimante sian simpatian al la nobla celo de la Esperantistoj kaj dezirante al la kongreso kaj al la Esperanto-movado plej grandan sukceson. I. a. li memorigis pri la Versailles'a Konferenco, kie mondpolitikistoj kiel Wilson kaj Orlando ne povis sin interkompreni, aldonante ke la Esperantistoj eble venkos, sed renkontos multajn malfacilaĵojn. S-ino Isbrücker, la simpatia edzino de la prezidanto, afable interpretis tion resume en Esperanto por la ekslerlandaj Esperantistoj. La prezidanto poste dankis al la kongresanoj pro ilia alveno, per kiu ili montris la amon al nia afero, pensante al nia kara Majstro kaj aliaj karaj pioniroj mortintaj. Li atentigis, ke la XII-a devas esti post la teruraj militjaroj bonvenigo al harmonio kaj laboro por rekomenca la konstruon.

Post tio nia fama verkisto kaj oratoro D-ro Edmond Privat per bombaj sed tute pacaj vortoj respondis al la urbestro, ke ne eble, sed certe Esperanto venkos, kaj kurtuŝe li rakontis pri la vivo kaj verkado de nia kara Majstro, haliante iom pli longe ĉe liaj lastaj tagoj kaj tro frua morto. Notinda estas la konfeso de lia servistino, kiu, montrante al S-ro Privat sub la krucifikso en la angulo de sia ĉambro la bildon de nia Majstro, diris: „Tiu ĉi homo neniam pekis!“

Per leviĝo estis honorata la memoro de la Majstro kaj de liaj karaj mortintoj.

Kiel vicprezidanto de UEA S-ro Privat salutis la kongreson ankaŭ en tiel nomo.

Post mallonga paŭzo aŭdigis la salutoj kaj bondeziroj de la oficialaj deleĝitoj, nome: S-ro J. W. Sevenhuijsen en la nomo de la Nederlanda Ministerio por Instruado, Arto kaj Sciencoj; Majoro *Josefo Perogordo* sendito de la Hispana Milita Ministerio kaj de la Ruĝa Kruco, Komandanto Alb. Alessio de la Itala Marina Ministerio, S-ro Ivan H. Krestanoff reprezentanto de la Bulgara Ministerio de Publika Instruado kaj S-ro Aug. Pitlik de la Ĉeĥoslovaka Ministerio de Komerco

*) La tuta Biografio de D-ro Zamenhof aperos baldaŭ ĉe Brita Esperantista Asocio. — Rim. Kr.

kaj Turismo. Pli malfrue alvenis ankoraŭ la Pola Konsulo S-ro de Kaczowski flanke de la Pola Registaro.

Post danko de la prezidanto sekvis la salutparoloj de la deleĝitoj de l' sekvantaj 24 naciecoj:

AŬSTRIO: D-ro Meÿger.
BELGIO: F-ino Jennen.
ANGLIO: S-ro Clayton.
SKOTLANDO: S-ro Kennedy.
KIMRIO: S-ro Edwards.
IRLANDO: S-ro Robinson.
BULGARIO: S-ro Krestanoff.
ĈEĤOSLOVAKIO: S-ro Pitlik.
DANIO: F-ino Rybo.
FINNLANDO: S-ro Päätilä.
FRANCIO: S-ino Cense, kiu ankaŭ salutis flanko de RUSIO kaj POLIO (el tiu ĉi ankaŭ S-ro Applebaum).
FRANCAJ KOLONIOJ: S-ino Tiard el ALGERIO.
GERMANIO: S-ro Ranft.
Germ. Katolika Asocio: S-ro Mielerf.
HISPANIO: S-ro Chaler.
ITALIO: S-ro Arabeno.
NEDERLANDO: S-ino Isbrücker.
Nederl. Katolika Asocio: S-ro Heilker.
SVEDIO: S-ro Nylén.
USONO: S-ro Frost.

(Ĉeestis ankaŭ reprezentanto de SVISIO, kaj pli malfrue alvenis ankoraŭ deleĝitoj de ESTONIO: S-ro Anofrijev; HUNGARIO: S-ro Laquer; Hungara Laborista Asocio: S-ro Sabo; JAPANIO: Prof. Citkao Fujisaita. La deleĝito de la Ligo de Nacioj ne sukcesis alveni.)

S-ro Isbrücker legis post tio la alvenintajn telegramojn kaj leterojn el plej diversaj partoj de l'mondo, kiuj pruvis, kun kia intereso oni rigardas de ekstere al la laboro de tiu ĉi kongreso. — Estis jam la 7-a h., kiam eksonis, komune kantate de ĉiuj ĉeestantoj, la bela himno de „La Espero“ kaj finis tiun neforgeseblan tagon, per kiu komenciĝas nova epoko de la jam riĉa Esperanto-historio.

Lundo.

La morgaŭan tagon — Lunde — en la sama salonego malfermiĝis la *VI-a Kongreso de Universala Esperanto-Asocio*. Ĝin prezidis D-ro Privat, kiu diris promemorigajn vortojn pri la grandaj herooj de nia movado: Hodler, Mudie, Rousseau, Zamenhof kaj Rektoro Boirac. Estis legata la letero de S-ro E. Drummond, Del. de la Ligo de Nacioj, kiu ne povis ĉeesti pro la kongreso en San Sebastian kaj esprimas la simpation de la Ligo de Nacioj al Esperanto kaj bondeziras sukceson al la kongreso. — S-ro Stettler laŭlegis la projekton pri renovigo kaj pliriĉigo de la statutoj de UEA, kiu, post vigla diskutado, estis akceptata kun malgrandaj ŝanĝoj.

Posttagmeze estis la *Unua Labora Kongreso-Kunsido* en la Kavalira Salonego. Post laŭleĝo de la protokolo la prezidanto aŭdigis ankoraŭ alvenintajn telegramojn kaj leterojn, inter kiuj notindaj estas tiuj de S-ino Zamenhof, Jugoslavio, Estonio, Brazilio, Generalo Sébert, Ministro de Instruado el Braunschweig, Perso Jasdani, de Hungaraj Militkapitoloj en Vladivostoko (Siberio), Corda Fratres, Aŭstralio, Litova Esp. Asocio, Prof. Bujwid, D-ro Mybs kaj Prof. Carl, memoriganta pri fideleco al la Fundamento.

Laŭ propono de la prezidanto la kongreso akceptis sendi saluttelegramojn al la Reĝino de Nederlando, al la Ministro de Riveroj kaj Kanaloj, al S-ino Klara Zamenhof kaj Generalo Sébert, kaj al la diversaj ministerioj, kiuj montris interese al nia movado per sendo de oficialaj delegitoj.

Poste la prezidanto legis, la propono de la Nederlanda Esp. Asocio „La Estonto estas nia” rilate al *Reorganizo de la Lingva Komitato* kaj ŝanĝo de ties regularo. Sekvis longdaŭra kaj vigla diskutado, en kiu partoprenis S-roj Applebaum (Polio), Warden (Britio), Nylén (Svedio), Krestanoff (Bulgario), Bünnemann (Germanio), Poncet (Francio) kaj D-ro Privat (Svisio). Aŭdigis plendoj pri mallaboremo de la LK kaj Akademio kaj sinseke ankaŭ kontraŭ la Centra Oficejo en Parizo, ĉe kiu niaj lingvaj k. a. institucioj estas koncentritaj kaj kiu estas malnavigota, kiu devas aŭ trovi pli da oficejoj aŭ transdoni parton de sia laborejo al UEA, ekzemple, des pli, ke tiu ĉi troviĝas en neŭtrala lando — plej konvena por niaj lingvaj institucioj — kaj havas 5–6 pagatajn oficejojn, kiuj laŭbezone povus esti pli nombraj. Ni devus liberigi, faciligi kaj reunigi . . . la tro da organizoj estis ŝarĝo por ĉiuj.

D-ro Privat prave diris, ke estas laŭdinde, ke la LK, kies devo estas kontroli la evoluadon de Esperanto, neniam faris: tiamaniere ĝi almenaŭ konservis la lingvon, kaj la Esperantistaro devus esti dankaj. Tamen pli urĝa estas la bezono de *Teknikaj Vortaroj*, kaj por ili ni unuvice kaj serioze devas labori. Varma estis la diskutado: kelkaj trovis, ke nia Esperanto per siaj ĝisnunaj vortaroj sufiĉas, aliaj estis kontraŭ tiu aserto. S-ro Süsmuth el Usono petis helpi lin ĉe preparo de vortaro por leksarto, kaj kiam ĝi estos preta, li donos ankaŭ la monon por prestigio. S-ro Poncet parolis pri medicina, aliaj pri pedagogia ktp. vortaroj. S-ro Arnold (Germanio) proponis, ke la LK ne estu elektota demokrate, sed pli science. S-ro Stettler disvolvis belan laborprogramon pri teknika vortaro, sed ne volas ĝin tro scienca. La tuta afero estos transdonata al fakuloj ĉe la LK.

La vespero kunigis ĉiujn kongresanojn en la Reĝa Teatro al *Koncerto*, kiu estis majstre direktita de S-ro J. van den Burg. La gesolistoj F-ino Huijsman kaj S-roj Vadesta, W. van den Burg kaj van der Pas, akompanitaj parte de S-ro Coenen kaj de la orkestro, alportis grandan muzikan ĝuon al la aŭdantaro, kiu per aplaŭdoj kaj florbukedoj malavare disdonataj (ni ja estis en la lando de la floroj) dankis. La kantoj, precipe amaj, estis en Esperanto. La unua kanto memkompreneble estis la Esperanta kaj la lasta la Nederlanda Himno.

Mardo.

La programo por la tria tago — Mardo — kunvokis ĉiujn al *Prelego kun Lumbildoj pri Praha* kaj Ĉeĥoslovakio de S-ro Pitlik. La ĉeestantoj

estis pli ol kontentigitaj per la belaj kolorbildoj el la juna kaj forta respubliko, kien ĉiuj estas kore invitatitaj por la XIII-a Kongreso.

Posttagmeze oni kolektiĝis por *Komuna Promenado* tra la Haga arbaro al la „Huis ten Bosch” — somera palaco, kies internon oni vizitis por admiri la belegajn porcelanaĵojn kaj pentraĵojn, precipe la vivon de la iniciatinto de tiu ĉi arbarpalaco. Komuna tagmanĝo kun Esperanta menuo — por viand- kaj vegetarmanĝantoj — kunigis ĉiujn je la 6 h. vespere en la „Roomhuis” ĉe la fino de l' arbaro. Tie la ĵus alveninta S-ro Vadim Anofrijev, ĵurnalistoj el Estonio, transdonis la salutojn de la Estonaj samideanoj. Sekvis interparoloj, amuzaj, deklamadaj kaj kantadoj de Ges-roj Applebaum, S-roj Andersson, Smit, Goemans, Arabeno k. a. S-ro Isbricker komparis Esperanton en sia rilato al la naciaj lingvoj kun aŭtomobilo rilate al ĉevalo. Kolekto por Franca samideano, al kiu estis ŝtelita en polico la tuta havaĵo, alportis 186 Guldenojn (372 Sv. Fk.), kio bone pruvis, ke „Esperantismo” ne estas vana vorto, montrante la konsenton kaj ligan inter la Esperantistoj.

Merkredo.

La sekvanta mateno — Merkrede — vidis denove la fervorajn kongresanojn en la *Dua Kunsido de UEA*, kie estis plene pridiskutata la fino de la statutoj kaj farata propono pri reorganizo de nia nova sed tre impresema liala samideano S-ro Alessio, kiu prave rimarkis, ke io ne marŝas en nia Esperantujo. Ĉar lia propono pri reorganizo de niaj institucioj estis de komuna intereso, li estis petata de S-ro Privat refari ĝin en kunsido de la kongreso, kiu rajtus pri tio voĉdoni. Post paroloj de S-roj Applebaum, Poncet k. a., S-ro Page el Skotlando dankis al la Direktoro de UEA, S-ro Stettler, por la bona elaboro de la statutoj, de ĉiuj kongresanoj aplaŭditaj. La sekretario S-ro Jakob eliris el la modesta subterejo kaj dankis por la fido, kiun oni havis ĉiurilate al UEA. S-ro Alessio postulis pli da lumo pri la oficialaj institucioj, al kio aliĝis S-ro Stettler k. a. Post pritrakto de malgravaj internaj aferoj la prezidanto D-ro Privat fermis la kongreson de UEA.

Je la dua okazis la *Kunveno de la diversaj Fakuloj*: kristanoj, pacifistoj, vegetaranoj, psikistoj, framasonoj, LK-anoj kaj laboristoj, kie D-ro Privat varme parolis kaj kie fratigis Franca kaj Germana kamaradoj. La lasta okazis en la Popoldomo, dum la aliaj en la Akceptejo, kie estis specialaj ĉambroj je dispono.

La vespero vidis la kongresanojn denove en la Reĝa Teatro, kie estis prezentata *Dramo „Juĝa Kunsido en 1813”* kaj *Komedio „Muzikvespero en 1813”*, ambaŭ verkita de F-ino J. Pabst kaj direktita de F-ino W. Wessels. Laŭdindaj prezentadoj des pli, ĉar ludataj de ne profesiaj kaj ne-Esperantistaj geaktoroj — diletantoj, studentaj Esperantoj nur dum 2–3 monatoj. La publiko ankaŭ rekonis ilian grandan servon kaj per longa kaj vere merita aplaŭdo dankis. Granda parolo de tiu danko estis al F-ino Boon, kiu ebligis per sia afabla interveno la prezentadon, ĉar mallonge antaŭe kelkaj aktoroj devis rifuzi sian kunhelpon. Per internacia kiso de 24 naciecoj al la reĝisorino kaj ĉefaktorino F-ino Wessels ŝi esprimis la varman dankon de la ĉeestantaro. La aliaj aktorinoj ricevis tiajn en belegaj floroj. Ĉe la fino estis aŭdigita „La Espero”. Vere laŭdinda estas F-ino Boon — la „bona patrino” —, kiu tiom kuris kaj helpis ĉie kaj ĉiun.

La teatraĵoj estis tre interesaj bildoj de malnova Nederlanda vivo. Programo kun dulingva resumado estis aĉetebla ĉe la enirejo de l' teatro. La unua teatraĵo estis speciale interesa por tio, ke ĝi admiringe pruvis la taŭgecon de Esperanto por ĵuĝaferoj. La advokato-defendanto de juna edzino kulpigata pro savo de sia edzo — Franca soldato — estis vere elokventa. Estis aŭditaj tri novaj vortoj: „darfi”, „ŝoki” kaj „kvaculino”, kiuj tamen ŝajnas necesaj nuancigoj de nia lingvo.

Pri la internacieco de l' kongreso parolas ankaŭ la sekvanta, tute senintenca kaj okaza fakto: en nia loĝo estis 6 personoj de 8 naciecoj: post mi (Germanio) mia edzo (Bulgario), kaj post li S-ro Laquer (Hungaro); flanke de mi S-ro Perogordo (Hispano), S-ro Warden (Skoto) kaj S-ino Cense, naskita Polino, edziniĝita al Franco kaj samtempe Parizano (la Francoj el Parizo sin nomas Parizanoj, ne Francoj).

Ĵaŭdo.

La kvinan tagon — Ĵaŭdon — kolektiĝis la anoj por *viziti la Paĉpalaco* aŭ pli ĝuste la Palacon por la Konstanta Kortumo de Arbitracio. Grandioza konstruaĵo, por kiu la antaŭ nelonge mortinta Andrew Carnegie donis 1 1/2 Milionon da Dolaroj. Por la konstruo de tiu palaco ĉiu lando donacis kelkajn. Iu samideano klarigis, ke la fenestrojn donacis Germanio, kaj alia — certe ŝerce — aldonis „por ke la paco ne eniru”. Ĉie, ekstere kaj interne, impresas lukseco kaj festeneco. Griza Norvega kaj Sveda granito, griza Germana sabloŝtono de Oberkirchen, ruĝaj brikoj de Leiden kaj ardezoj por la tegmento estas bele kombinitaj al kvadrata altura konstruaĵo. Antaŭ ĝi troviĝas herbejoj, dekstre rozĝardeno laŭ Angla maniero kaj malantaŭe pitoreska parko kun lago — vere pacifista fono! Alegoriaj figuraĵoj ĉe la fasado kiel interne rilatas al la signifo de la palaco kiel sidejo de justeco kaj paco.

En la palaco estas admirinda la delikata utiligo de la riĉaj materialoj. La planko de la impona enirhalo estas pavimita per mozaikoj el pura liala marmoro, formantaj en la mazo stelon, ĉirkaŭtatan de la sentenco: *Sol justitiae illustra nos* (Suno de l' justeco, lumu sur nin!). En la granda kunsida salono la muroj estas kovritaj per belege brodita silko, por kiu 500 Japanoj dum 50 jaroj laboris, la roza ligno estas palisandra el Brazilio, la lustroj Holandaj, la argento Hispana ktp., kaj la Turka tapiŝo estas unu peco, same kiel sur la ŝtuparo en la granda halo. Multaj admirindaj pentraĵoj, precipe de Ferdinand Bol (1600), kaj ĉe speciala salono de la pentristo. Sur la plafono bildoj de Amikeco, Libereco, Justeco kaj Paco, Kristo-staŭto en la halo, busto kaj portreto de la grandanima iniciatinto de l' palaco — la Usona Skoto Carnegie — kaj de la Rusa eks-caro Nikolao II, la iniciatinto de la unua pac-konferenco k. a.

Tiun tagon por unua fojo la paĉpalaco aŭdis la lingvon de la paco, kiel prave rimarkigis S-ro Page. Neniaĵo ĝi vidis pli verajn pac-amantojn. Ni Esperantistoj, pacaĵ batalantoj, estis en nia vera domo. Ni esperu ke, kiam ni revenos, la vera paclingvo tie estos parolata.

Antaŭ la palaco atendis la Esperantistaron du speciale rezervitaj tramveturiloj el po tri vagonoj bele ornamitaj per Esperantaj flagoj, steloj ktp. Ili gvidis nin tra la tuta urbo dum tagmezo, kiam la movado en la stratoj estas plej granda. Jen bela, efika kaj liminda propagando! Tuta Hago sciigis tiamaniere, kion signifas tio kiel kiam celon havas nia movado. La entuziasmo estis granda

VI^a Internacia Kongreso de Katolikoj en Hago.

La duan fojon Hago, vi, felica urbo en felica lando, havis la favoron gastigi la katolikajn Johano- kaj Paulonimojn kiuj, malgraŭ ĉiuj regantaj teruraj malfacilaĵoj, estis alkurintaj por kunsoleno kun vi, karaj Nederlandaj samkredanoj, la unuan postmilitan Mondpentekoston, la unuan postmilitan am- kaj pacfeston dum tempo, kiu povus kredigi nin, ke kristana frata amo tute eslingigis. Ne, nepe ne! Ni, partoprenintoj de ĉi tiu mirinde fruktopierna kongreso alvokas al la mondo: Rigardu Hagon! kaj eksciu, ke la vera kristana amo internacia nur malgrate devis atendi dum la ekscioj de la freneza homaro, ĝis . . . nu, ĝis „Nia Sesa” en Hago denove povis montri al la mondo, ke ni neniam forgesis la kortusantan adiaŭnan vorton de nia kara Savinto: „Infanetoj, amu vin unu la alian!” Vere, pentekosta spirito regis en la animoj de la multaj katolikoj el Anglujo, Aŭstrujo, Francujo (kaj kolonioj), Germanujo, Hispanujo, Italujo kaj Nederlando; hazarde Nederlando siaros lasloke en ĉi tiu alfabela vico; tamen, laŭ la vorto: „La lastaj estas la unuaj!” mi volonte jam nun plenumas mian devon danki tiukore al ili, el niaj karaĵ samkredanoj, kiuj grandparte al mi malriĉaj Germanoj kaj Aŭstrujanoj ebligis ĉeesti pro sia vere nobla gastameco, danki al ili ankaŭ por tio, ĉar ili iniciatis kaj tiel bele arengis ĉi tiun mondhistorian kongreson.

Jam dum la XII-a okazis kvar kunvenoj de la katolikaj partoprenintoj, en kiuj estis detale pritraktitaj la diversaj kongresotaskoj. Krom tio ĉi specialaj komisiaj laboris en apartaj kunvenoj, kaj per tiaj antaŭpreparaĵoj la kongreso staris jam en la malferma kunsido antaŭ pozitivaj rezultoj:

1. Estis fiksata la unueca teksto de la ĉefaj preĝoj aprobo de la S-ia Seĝo:

„Laŭdata estu Jesuo Kristo. En eternecon. Amen. En la nomo de la Patro, kaj de la Filo, kaj de la Spirito Sankta. Amen.”

PATRO NIA, kiu estas en la ĉielo, sanktigata estu nomo via. Alvenu regno via. Farigu volo via, kiel en la ĉielo tiel ankaŭ sur la tero. Pardon nin ĉiutagan donu al ni hodiaŭ. Kaj pardonu al ni ofendojn niajn, kiel ankaŭ ni pardonas al ofendintoj niaj. Kaj ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de la malbono. Amen.

SALUTON, MARIO, graco plena; la Sinjoro estas kun vi. Benata vi estas inter la virinoj, kaj benata estas la frukto de via korpo, Jesuo. — Sankta Mario, Dipatrino, preĝu por ni pekuloj, nun kaj en la horo de nia morto. Amen.

Mi kredas je Dio, la Patro ĉiopova, kreinto de la ĉielo kaj de la tero. Kaj je Jesuo Kristo, lia unusola Filo, Sinjoro nia; kiu estas konceptita de Spirito Sankta, naskita el Mario, la Virgulino, suferinta sub Poncio Pilato, krucumita, mortinta kaj entombigita; Il malsupreniris al infero; la trian tagon revivigis el la mortintoj; supreniris ĉielon, sidas dekstre de Dio, la Patro ĉiopova; de tie li venos por ĵuĝi la vivantojn kaj la mortintojn.

Mi kredas je la Spirito Sankta, la sankta Eklezio katolika, la komunigo de la Sanktuloj, la pardono de la pekoj, la revivigo de la karmo, la vivo eterna. Amen.

GLORO al la Patro, kaj al la Filo, kaj al la Spirito Sankta. Kiel estis en la komenço, kaj estas nun, kaj estos ĉiam, kaj en ĉiujn jarojn de ĉiujn jarojn. Amen.”

La komisio datrigos sian taskon fiksi la tekston de pliaj preĝoj.

2. Komisia estis nomigata, kies tasko estos prepari skriban kurson por la gvidantoj kaj ĉefaj personoj de la internaciaj fakorganizoj kristanaj.

3. Post la referato de l' subsigninto „Religiaj Esperanto-Festadoj”, la kongreso decidis, okazigi jam dum la venonta kongreso la reprezentadon de la de kolono Zwoch el Wien Esperantigita misterio de Erich Eckert: „La Savo de l' Mondo”.

4. La plej ĉefa rezulto: Melaperis la ĝisnuna „Internacia Katolika Unuigo Esperantista” (IKUE) kaj estis fondata la

Internacio Katolika (Ika).

Kial? Antaŭ la milito nepre estis necesa nia kara IKUE, ĉefe laboranta por la disvastigado de Esperanto inter la katolikaro. Dum furiozaj la mondilito, ŝanĝante tute la vizaĝon de l' terglobo; ŝanĝigis la malnova tero, ŝanĝigis la homoj; estigis novaj urĝaj problemoj kaj taskoj solvotaj, kaj fine alproksimigis la momento de l' sinvenko de nia kara lingvo. Do, la unueca konvinko de la kongreso estis, kaj kun ĝi juĝas konforme ĉiuj IKUE-anoj, kiu devis resti helme, ke la nova tempo bezonas novan organizaĵon multe pli ampleksan, pli larĝan, mond-cirkaŭprenantan: Internacio Katolika; laboranta per Esperanto por la efektiveco de la katolikaj principoj.

Jen do la celo de Ika: La agema kunlaborado de la katolikoj ĉiulandaj por efektivegi la veran praktikan kristanisman en la persona, familia, sociala, ŝtata kaj interŝtata vivo laŭ la principoj de la Katolika Eklezio.

Kaj jen la specialaj taskoj de Ika:

a) La internacia interkompreniĝo ĉu de opaj katolikoj ĉiulandaj ĉu de la katolikaj organizoj, rilate al unueca kunlaborado pri la solvo de la urĝaj problemoj de la nuntempaj religiaj, socialaj, kulturaj kaj moralaj taskoj.

b) La daŭra financa subteno de Centrejo de Ika, por ebligu reciprokajn interrilatojn de ĉiuj samcelaj katolikaj landorganizoj, perdi reciprokajn ŝanĝadon de sperto ktp, organizi internacian konferencojn kaj kongresojn kaj eldoni internacian organon de Ika, mondvaloran katolikajn librojn.

c) Ekstarigo kaj daŭra konservo de delegitaro diversnacia zorganta ankaŭ pri laŭbezona reidono de Katolika Adresaro de ikanoj.

Vere glora, mirinda celo, inda je la plej serioza laboro de l' spirito-nobeluloj katolikaj!

„Esperanto Triumfonta” eliros ĝis Novembro dufoje en la monato, kaj nur deĉepo Novembro ĝi aperos ĉiusemajne. Tial la unuaj numeroj ankoraŭ ne povas esti kompletaj; ĉar mankas nun la loko por multaj interesaj artikoloj kaj sciigoj. Bonvolu do pardoni la provizoran ne-kompletecon de ET!

Abonojn al ET

oni bonvolu pagi per Resp.-Kup. (15 por 10 n-roj), per ĉekoj sur Germanaj bankoj aŭ per ĉi-sube indikitaj ŝtataj bankbiletoj.

Ni liveros por 20 gmk. 14 n-rojn de ET, por 10 ŝil. 10 sv. fk., 10 pesetoj aŭ 5 hfl. 35 n-rojn, por 10 fr. fk. 20 n-rojn, por 10 nordaj kr. 40 n-rojn, por 10 italaj liroj aŭ 1 dolaro 15 n-rojn, por 10 finnaj mk. 10 n-rojn. — Tiuj-ĉi prezoi valoras por ĉiuj landoj kun valuto pli alta ol la germana. Al Germanujo, Ĉeĥoslovakio, la Balkano — aŭ la Baltikaj landoj ni liveros 10 n-rojn por 10 gmk. aŭ 15 n-rojn por 20 ĉ. kr. — Al Aŭstrio, Hungario kaj Polujo ni liveros 15 n-rojn por 10 gmk.

Ĉiu abonanto rajtas enpresigi malgrandajn anoncojn senpage. — Subtenantaj abonantoj pagas duoblan abonsumon kaj rajtas enpresigi grandajn anoncojn senpage.

Ĉiu varbanto de abonantoj ricevas esoncie po 10 varbitaj numeroj unu numeron senpage.

Sinjoro Tadeo

Epoepo de plej granda Pola poeto A. Mickiewicz, en majstra traduko de Antoni Grabowski.

La verko estas kvazaŭ profeta vizio de la nun reviviĝinta Polujo kaj prezentas grandiozan pentraĵon de la lando kaj ĝia loĝantaro.

300-paĝa, bele eldonita libro, grandforma, estas acetebila pere de la Varsovia Delegito de UEA Adolfo Oberrotman, Krak-Przedm. 10, Varsovio. Prezo 3 Fk. Svis. aŭ 12 Resp.-Kup.

Sercas Eldoniston

por „Nuntempaj Rakontoj“ de Bulgara verkisto G. P. Stamatov, okupantaj belan 50—60-paĝan broŝuron, kaj por „Baj Ganjo Balkanski“, humora rakontaro de Aleko Konstantinov, okupanta saman nombron da paĝoj.

Ambaŭ tradukitaj de Iv. Krestanoff LK. kaj tradiditaj de ELA.

Sin turni al: Iv. Krestanoff, Dresden (Germanio) Schumannstr. 31 (post Okt. al Pirdop, Bulg.)

Helpemuloj, atentu!

Juna talenta sed malriĉa studento, kies sola aspiro estas fariĝi inĝeniero, intencas aŭtune veturi Francujon por viziti la teknikan alfernejon en Nancy kaj kore petas la gesamideanojn iel helpi al li daŭrigi la lernadon. Leterojn bonv. adresigi al

J. Fŭrn, Estonia Esp-ista Unuiĝo „Espero“ Riiulil t., 6, Tallinn, Estonio.

Filatelistoj!

Mi estas en rilato kun tre granda firmo de Polaj poŝtmarkoj. Belaj kolektoj. Maloftaj, antikvaj militaj markoj riceveblaj kontraŭ antaŭpago aŭ ŝanĝo de ne uzitaj poŝtmarkoj ĉe

Ad. Oberrotman, Warszawa Krak-Przedm. 10.

Bonega Okazo!!

Poŝtmarkoj Bulgaraj de ĉiuj ĝisnunaj eldonoj, uzitaj kaj ne, ankaŭ kun surpriso „Thrace Interalliee“ (tri eldonoj), „Thrace Occidentale“ (mankas nur taksaj pm.), „Poŝto en Rumanio“, „Por niaj militkaptitoj“ (aperis dum junio lasta en tre limigita kvanto: 2 Stof — 3 Levja) estas vendataj pogrande en kompletaj aŭ duonserioj. Eventualaj acetontoj aŭ personoj dezirantaj peri la disvendon petu vendprezojn, sciigante al mi la eble deziratan kvanton da poŝtmarkoj. La prezoj, estante en Bulgara Levjo, estas tre favoraj por alilandanoj. Nur tiuj, kiuj serioze intencas aĉeti, sin turnu al

Panajot At. Kolev, Sofia (Bulg.) str. Regentska 19.

POŝTMARKOJ

de Württemberg'o (lastaj eldonoj kaj maloftaj), de Bavario (Volksstaat, Freistaat ktp.), de Germanio (novaj)

estas acetebblaj je akcepteblaj prezoj ĉe Samideano-Filatelisto OTTO WELZEL 31/2, Krämerstrasse, Reutlingen, Württ., Germ. PREZ-LISTON mi sendas al seriozaj acetantoj.

E-istaj Socialistoj, abonu la gazeton ESPERANTISTA LABORISTO!

8-paĝa gazeto redaktata tute en Esperanto. Redakcio: E. ADAM, 24 Bd. Beaumarchais, Paris XI. Administracio: L.GLODEAU, 177 Rue Baguot, Paris. Jara abono: Francio 5 Fk., aliaj landoj 5,50 Fk.

Ĉiulandaj komercistoj kaj industriistoj vizitu la

3^{an} Internacian Foiron de Frankfurt a. M.

Importo

3-9 Oktobro 1920

Eksperto



Ampleksa ekspozicio de sekvantaj branĉoj:



1. Teksproduktaĵoj.
2. Sportbezonaĵoj.
3. Ŝuoj, ledoj kaj aliaj.
4. Ledoj kaj vojaĝartikloj.
5. Juveloj, or-, argent- kaj ornamaĵoj, horloĝoj.
6. Artikloj por fumantoj.
7. Armetio, hina kaj japana imitaĵoj.
8. Konstruado, higienaj instalaĵoj.
9. Maŝinkonstruado.
10. Elektrotekniko.
11. Artikloj por lumigado.
12. Metalaj, elektraj artikloj por malalta tensio
13. Kuiraj kaj maŝtrumada ilaro.
14. Industrio de vitro, porcelano kaj fajenco.

15. Medicino, Ĥirurgio, gumaĵoj.
16. Sapoj, parfumoj, tualet-artikloj.
17. Kemia industrio.
18. Brosiloj, balailoj, penikoj.
19. Tabakproduktaĵoj k. subindustrioj.
20. Utensiloj por kontoro kaj aferistoj, reklamo.
21. Paperoj, kartonaĵoj.
22. Pak-materio.
23. Galanterio.
24. Ludiloj, instruiloj.
25. Meblaro kaj aliaj.
26. Korbaj, kanplektitaj mebloj.
27. Muzikinstrumentoj kaj notoj.
28. Maŝinoj, instrumentoj por agrikulturo kaj ĝardeno kulturo.
29. Veturiloj de ĉiu speco.

Prospektoj en la lingvoj germana, franca, angla, itala, hispana, holanda, dana, norvega, sveda kaj en Esperanto.

Korespondado en Esperanto!

Oni petu tuj detalajn informojn de

Messamt Frankfurt a. M. (Germ.)
Esperanto-Fako.

Esperanta Finnlando

Aperas 24-paĝe regule la 15-an de ĉiu monato kun interesa, bonstila, ilustrata enhavo.

Redaktata ekskluzive en Esperanto de Vilho Setälä, Alberg.

Eldonata de

Eldona Akcia Societo „Otava“
Adr.: Ludenmaank. 10, Helsinko (Finnlando).

Ĉu vi estas kontraŭulo de la junularo?

Certe ne! Tial helpu la tutmondajn gejunulojn ekabonante la novan internacian gazeton

JUNECO

Monata Revuo eld. de junuloj por ĉiuj junkoruloj.

Pro la facila stilo kaj interesa enhavo tre rekomendinda por Esp.-komencantoj. Postulu specimenon de

Fratoj Fethke, Oppeln
Supera Silezio (Germ.), Ring 11.

L'Esperanto

Internacia Monata Revuo sub patronado de „Itala Katedralo de Esperanto“ — *Eliras en S. Vito al Tagliamento (Ital.)* —

Literatura kaj Koresponda Fako Lingvaj Leclonoj per Esperanto Enigmoj — Konkursoj.

Jarabono Itala Fk. (Liroj) 5.

Plena Kurso de Itala Lingvo por Esp-istoj Itala Fk. (Liroj) 6,50.

Anoncetoj.

ACETO. Tom A. Allan, 91 Prud'homme Ave., N. D. G. Montreal, Kanado deziras aĉeti la vortaron de Kabe.

FERVOSTOJ! Por propaganda poŝtark-ekspozicio mi petas alsendon de stacidomaj vidaĵoj kaj de fervojaj konstruaĵoj. Al ĉiuj mi resendos Pl. Mi ankaŭ korespondos. Georg Habelok, Breslau 10 (Germ.), Schleiermacherstr. 19.

FILATELIO. Estonajn poŝtmarkojn purajn kaj ŝtampitajn mi vendas. Antaŭpago. Deziras interŝanĝi papermonon. I. Vahikeri, Luksentali 5, 11 Tallinn, Estonio.

FRAŬLINO aŭ virino kun serioza karaktero tuj serĉata por la gvidado de la mastromado de familio kun 3 maljunaj personoj. Mansfeld, Merseburg/Saale (Germ.), Wilhelmstr. 4.

INTERSANĜO KAJ KORESPONDO. Leono Funken, Florinsmarkt 7a l. Koblenz (Germ.) deziras interŝanĝon de helpa (milita) mono (sole biletoj) kaj vendon de sia kolektaĵo. Li ŝatus ankaŭ korespondadon per Angla kaj Franca lingvoj kun alilandaj ges-anoj, precipe bankistoj.

KORESPONDO. Francisko Prengel deziras interŝanĝi ĉiulandajn E-gazetojn; korespondas per PK il. bildflanke, ĉiam respondas. Adr.: Bydgoszcz-Bromberg, Podgórze 17, Polio.

KORESPONDO. * Karel Doupeye, Dampoortstraat 21, Sint-Kruis (Brugge), West-Vlaanderen (Belgio), 19-jara tribunalo-Oficisto, korespondas L kun ges-anoj pri filozofiaj, sociaj kaj politikaj temoj, PK kaj L kun fraŭlinoj pri ordinaraĵaj temoj.

Korespondadon kun komencantoj

deziras sekvantaj Litovaj instruistoj-samideanoj:

ALYTUS (= loko). Juozas Bloznelius, instruisto, Riliŝkiu sodz., Merkinės val.

ALYTUS. Petras Urbonas, instruisto, kaŭmas Varnageriai, Krokioi. val.

KALVARIA. Julius Daugilas, instruisto, Zagariŝkiu mokykla, Punksko val.

LAZDIJAL. Seinu apsk. Antanas Maksimavičius, instruisto, kaŭmas Akmenė, Kučiuonu val.

LAZDIJAL. Seinu apsk. Jokubas Azuolaičius, instruisto, Veiseju mokykla.

SEIRIJAL. Alitaus apsk. Juozas Grauzelius, instruisto, kaŭmas Ročliu.

SIMNAS. Stasias Svinkunas, instruisto, Krokininku mokykla, Krokioi. val.

S-ro James A. Meagher, 12 Westmoreland Street

Dublin (Irlando)

plazure klarigos la tuŝan

Irlandan Problemon!
Ĉu vi interesiĝas pri ĝi?

Nia Dekdua.

(Fino de la Kongres-Raporto el la unua folio.)

S-ro Sharpe (Roŝo) rememorigas la vortojn de nia Majstro pri enkonduko de Esperanto kaj rekomendas la vojon de malsupre (la popolamasoj) — la registaroj nur devas sankcii. S-ro Applebaum konsilas, ke la propono estu prokrastata. S-ro Stettler diras, ke la propono de la Pola societo estas tre komplika, kaj ke la Ligo de Nacioj estas tro supersufiĉa per aliaj aferoj, kaj ni ne fermu al ni la pordon per certa malakcepto — ni estu praktikaj. Kaj efektive kiel turni nin al Ligo, kiu ekzistas ankoraŭ nur sur papero kaj pli prave povus esti nomata Ligo de Akcioj. Voĉdone oni malakceptis la proponon, atentigante ke ĉiu nacia Esp. societo laboru aparte por la enkonduko de Esperanto.

La dua propono estas tiu de D-ro Leono Zamenhof — frato de nia Majstro — pri kreo de *Internacia Hejno*, eble en Svisio, donante eblon al ĉiu Esperantisto por negranda sumo pasigi certan tempon en neutrala loko, kie estas aranĝota ankaŭ Esp. Muzeo kaj Sanatorio. Por ties mastrumado la iniciatinto proponas kaj oferas la reston de sia vivo. Intante de la ideala al la reala flanko, tiu ĉi entreprenon bezonus unu milionon da Frankoj, dispartigitan en 200 akcioj po 5000 Fr. S-ro Stettler klarigas la aferon kaj trovas, ke la tuta projekto ne estas tute preta kaj tie malfacile realigebla. Post diskutado la propono estas resendita, ĉar estas privata kvankam subteninda afero.

La lasta punkto estis la propono de S-roj Mann kaj Applebaum pri starigo de *Liberempejoj por junaj Esperantistoj*. Post pridiskuto estis akceptata simpat-rezolucio, sed ankaŭ tio ĉi estas privata.

S-ro Krestanoff proponas, ke pro manko da tempo oni finu la diskutojn pri flankaj aferoj kaj esprimu dankon al la aranĝintoj de la XII-a, pri kies sukceso ne malmultaj dubis kaj kiu nun prave povas esti komparata al la unua en Boulogne.

S-ro Pitlik invitis akcepti *Praha'n* kiel lokon por la *XIII-a Universala Kongreso*. S-ro Warden subtenas ĝin kaj post kiam komandanto Alessio deklaris, ke Italio ne povos nun aranĝi kongreson, oni akceptis la proponon de S-ro Pitlik, kion oni transdonos por plua studado al la KKK.

[Tie ĉi ni subtenas la akcepton, des pli ke la lastan tagon estis ricevita invito de la urbestro mem de Praha, kaj pro la sekvantaj motivoj: 1. Praha troviĝas en centra Eŭropo, do atingebla por ĉiuj; 2. ĝi troviĝas en duoneŭtrala lando; 3. la Ĉeĥoslovaka valuto estas favora por ĉiuj; 4. Praha estas proksima al Varsovio, kien oni povas fari postkongresan pilgrimon.]

Majoro Perogordo dankis en la nomo de ĉiuj kongresanoj al la Haga kongreskomitato kaj ties prezidanto por la bonega aranĝo de tiu ĉi kongreso. Longdaŭra aplaŭdo pruvas la unanimecon kun tio. Vere tiu estis kongreso tiel bele aranĝita, ke oni povis plene ĝui ĉion sen troa laciĝo, ĉar ankaŭ ripozo estis ebla, dum aliaj kongresoj estis supersarĝitaj.

* Kiel nin sciĝis Hungara samideano, la XII-a decidis aranĝi la Postkongreson 1921 en Budapeŝt. — Red.

La prezidanto dankis kaj laŭlegis ankoraŭ alvenintajn leterojn kaj telegramojn kun bondeziroj. Multaj parolantoj dankis al la kongres-komitato, kaj estis proponite donaci kiel signon de dank-esprimo al la prezidanto inĝ. Isbrücker la buston de Dro L. L. Zamenhof, kiu troviĝis en la salonego. Unuvoĉa kaj aplaŭda konsento. Je la unua horo la prezidanto danke fermis la kongreson. Tri versoj de „La Espero“ elsonis kaj kun: „Ĝis revido!“ oni disigiĝis.

Posttagmeze okazis *Lumbilda Parolado* de S-ro Krestanoff, kiu kiel ĉiam en vigla kaj scienca maniero faris kun la ĉeestantoj spirititan vojaĝon al sia patrolando Bulgario — la malo de Holando pro siaj aliaj montaroj. Atentiginte pri ĝia kultura rolo dum la X-a ĝis XIII-a jarcentoj (la Bogomila movado de ideoj pri libereco, egaleco kaj frateco, antaŭiranta la Reformacion kaj la Francan Revolucion, kiuj ne malmulte ŝuldas al ĝi) li montris per sesdeko da lumbildoj kelkajn naturbelajn kaj multkolorajn nacikostumojn Bulgarajn. Estus dezirinde, ke iu el la venontaj Universalaj Kongresoj okazu en Sofia — ĉefurbo de Bulgario kaj centro de la Balkana Duon-insulo, des pli ke tien la Esperanta radio unue penetris kaj disvastiĝis eĉ inter oficialaj rondoj.

* * *

Dum en la Akceptejo Sabate vespere estis *Adiaŭa Kunveno* de la gekongresanoj kie oni ĝis malfre amuziĝis per ludado, babilado ktp., ni estis invititaj al la hejmo de la kongres-sekretario *S-ro Brujin*, kie ni provis S-ron Ellersiek. La tempo ĉe la ĝistama familio pasis en agraba interparolo, kiam post la nacia horo sonoris kaj alvenis la japana delegito S-ro Fujisaba kun sia ĉarma edzino. Li kun granda bedaŭro aŭdis, ke jam la 14 (anstataŭ la 15 Aŭgusto) finiĝis la kongreso, dum kiu li intencis paroladi pri la *nova Japanio* kaj kies edzino volis montri vere Japanan „Kimonon“ dum la kostumbalo. Ni interbabilis, kaj subite S-ro Ellersiek ekriis, ke nun devus esti scienca skeptikulo ĉi-tie por vidi, kiel ĝi naciecoj sin povas kompreni nur per Esperanto kaj ankoraŭ tiel bone!

Vivantaj propagandiloj dum la kongreso estis tri per Esperanto edzigitaj paroj: 1. Geblinduloj — li Hispano, ŝi Nederlandano, 2. Gesinjoroj Blaise — li Belgo kaj ŝi Anglino, kaj 3. ni mem — mia edzo Bulgaro kaj mi Germanino, kies familia lingvo estas preskaŭ nur Esperanto.

Nederlanda diplomato S-ro van der Vies (estonta Esperantisto) konatiĝis kun ni kaj rakontis al ni nian antaŭedziĝan historion, kiel ni en 1908 skribe konatiĝis, kie kaj kiam ni denove — en 1916 — ekkorespondis ktp. Li eĉ notis la datojn. Post la ferma kunsido de l' kongreso ni renkontiĝis kaj li petis prezenti al ni Germanon D-ron von Hagen, iun sekretarian de la Ligo de Nacioj. Post la prezento tiu ĉi ekriis: „Ah, Sie sind die korrespondierende Dame!“ (Ha, vi estas la korespondinta sinjorino) kaj ankaŭ miregis pri la forto kaj utileco de nia lingvo.

Demandante min, ĉu oni ion sentas en la rilatoj de la gekongresanoj pri la milito kaj ties malpacoj, mi kun ĝojo povis respondi, ke nenio estas rimarkebla, krom ke ĉiuj sin sentas homoj

Lundo la 16-an de Aŭgusto ni ĉeestis al **S-ta Meso** en la preĝejo de la Rev. Fratinoj de S-ta Karolo Borromeo. Antaŭe estis okazis **kongres Esperantlingve**. Preskaŭ ĉiuj profitis de ĉi tiu hodiaŭ ankoraŭ siranga okazo: kaj poste, okaze de la S-ta Komunio, por la nuna tempo vere nekultiva bildo prezentiĝis: pace genuflekis Franco apud Germano, Anglo apud Aŭstro. — la „malamikaj fratinoj“ unuigite antaŭ la komuna tablo de la komuna Sinjoro. Sed al kiu ni ŝuldas fine ĉi tiun miraklon? Al nia kara lingvo, la Mondpentekosta lingvo! Vere **internacia komunio!**

Post la S-ta Meso, parohestro Poell memorigis en **funebra prediko** pri la karegaj amikoj jam dormantaj la eternan dormon, instigante nin preĝi por ĉi tiuj katolikaj herooj, ke Dio rekompenclu iliajn ofervojn kaj elasu iliajn eventualajn pekopunojn.

En la **Labor-Kunsido** je la 10-a antaŭtagmeze unue p-ro D-ro Meşger parolis pri la pacmovado, ekflamigante la korojn por ĉi tiu vere krist-katolika idealo. Poste la kongreso akceptis la novan statuton preligitan de la special-komisio por la „Ika“.

La kunsido ĉeestis ankaŭ S-ro Krestanoff kun edzino el Bulgario, kaj rimarkinda estas lia salutparolo, en kiu li konstatis, ke li tre simpatias kun nia Eklezio, kvankam li mem ne estas katoliko kaj estas edzigitu kun protestantino. Li tre ĝojis, ke la katolika Eklezio ankaŭ laboras elektiviĝi la internan ideon de l' Esperantismo, kaj antaŭvidas, ke ĝi, estante la plej universala religio de l' mondo, en la estonto unuigos ĉiujn popolojn en unu ŝafajo.

Gustatema respondo je la telegramoj, fersenditaj krom al Lia S-ta Patro al ĉefepiskopo Kardinalo Moŝto D-ro Pijl en Wien, Episkopo Moŝto A. Diepen en 's Hertogenbosch, Sia Regina Moŝto Wilhelmino de Holland, nur de la reĝino alvenis.

Je la 5-a posttagmeze komencis la **Ferma Kunsido**, al kiu ĉeestis l. a. ankaŭ F-ino Kicipoov, sekretarino de la Federacio de Katolikaj Ligoj de Virinoj en Nederlando. Oni pritraktis la detalan regularon de l-ka fine elaborota de la special-komisio kaj elektis la tri prezidantojn jam menciitajn, la ŝtatin direktorojn de preskaŭ ĉiuj landoj kaj la ĉefsekretariojn de l-ka.

sen naciecoj, sin sentas gefratoj de granda familo, kaj la plej bona privo por tio estas, ke Anglino S-ino Margaret Blaise fariĝis mia plej amata amikino. Li konfesis de si mem, ke li neniam vidis tiel *fervore laborantan kongreson* kiel la Esperantan.

La vesperon de la unua kongrestago granda parto de la Esperantistoj vizitis la mirinde belan banlokon *Scheveningen* — 15 minutojn pro framo de Hago — kie oni ĝuis la vesperon ĉe la marbordo kun sia dika, pura farun-simila sablo. Malantaŭ bulvarado plenplena de promenantoj diversvestitaj per naciaj kaj aliaj kostumoj. Kaj malantaŭ tio la grandegaj iluminitaj hoteloj, en kiuj la milionuloj kaj militprofituloj gvidas la vivon kaj elspezas multege da mono, kion oni povis cetere fari en tuta Nederlando, ĉar ĉie kaj ĉio estas sufiĉe multekosta — tie kelkajn milojn da Markoj kostas je ĉiu la kongres-semajno. Sed oni ankaŭ havas belajn aferojn por fio. La ĉambroj estas ludonataj kun matenmanĝo, kiu estas tiel komleta, ke oni povas sin provizi ankaŭ por la dua matenmanĝo. Oni havas tie: teon aŭ kafon kun lakto kaj sukero, panon blankan kiel vato, nigran panon en formo de brikoj nomata „Pumpernickel“, viandajojn, ovojjn, kolbasojn, konfitojn, buteron, biskvitojn, dolĉajn panetojn, la famekonatan Holandan fromaĝon k. a. Je tagmezo oni luncas kaj vespere oni tagmanĝas. Kiel trinkajojn oni prefero mendas glason da freŝa Holanda lakto. Ĉio abunda, bongusta!

Rimarkindaj estas la moneroj pro sia malgrandeco. La arĝenta dekkenda (20 centimoj) kaj la kupra duoncenda estas tiel malgrandaj kaj maldikaj, ke ili preskaŭ perdiĝas. La kvincendaj estas kvadrataj.

Aparte de la Universala Kongreso okazis la **VI-a Kongreso de Esp. Katolikoj**, sufiĉe agema kaj bonvizitita. Dimanĉe la 18 Aŭg. okazis ankaŭ *Katolika Diservo*. La laboristoj havis ankaŭ duan kunvenon. Dimanĉe kaj Lunde, la 15 kaj 16 Aŭg., grupoj da samideanoj forveturis ekskurse al la belaj kaj vidindaj havenurboj, la fieraj *Rotterdam* kaj *Amsterdam*.

Notinda estas ankaŭ la vizito al la Reĝa Pentraĵejo „Mauritshuis“, kie ni admiris vere artajn pentraĵojn de Rembrandt, Rubens, Saveni, de Vos, van Dyck, Molenaer, Potter, Trost, impresantaj kun siaj detalajoj, precizaj, reflektaj, siluetoj ktp.

Entute la kongrestagoj restos neforgeseblaj en ĉies memoro kaj ties rememoro instigas al vizito de pluaj Esp. kongresoj. La elsabligo en Nederlando Esperanto-arbo esereble baldaŭ reakirois sian riĉan foliaron, sub kies ombro la granda kolegaro povos pace reeklabori, por ke baldaŭ el la centro de Eŭropo ni montru al la skeptika mondo nian moralan forton kaj venktriumfon. Sparu por la XIII-a kaj kuraĝe antaŭen!

(Speciala Korespondajo por ET.)

Margarete Iv. Krestanoff
Dresden, Schumannstr. 31.

La Haga Semajno pruvis al ni, ke Esperanto ne mortis. Ankaŭ vi, ŝajne mortinta samideano, pruvu, ke la milito ne mortigis sed nur dormigis vin! Vekiĝu, jam estas tago!

VI-a Internacia Kongreso de Katolikoj en Hago.

(Fino.)

Ĝuego por ĉiuj estis la mirinde klara, trafa, mallonga parolado de nia prezidanto pri „La Internacia Unuigo de Katolikoj de la Agado“.

Li konstatis, ke la katolikaro tutmonda ĝis nun tiom malmulte internacie kunlaboris, ĉiam denove en ia ĝin lando komencas verkon eble jam efektiviĝantan en alia lando, do uzante la sperton reciprokajn. Nun, dank' al Dio, ni posedas esperlan ilon por kune labori, nian „Internacio Katolika“. Ĝiaj antoj estu la „Katolikoj de la Agado“. Ni ja meritas jam nun ĉi tiun titolon, ne nur parolante — kiel aliaj — pri kunlaborado dezirinda, sed fondante taŭgan internacian ligon. Monro da taskoj plenumotaj staras antaŭ ni. Ni konsas klare nian celon kaj volegas realigi ĝin. Komparante nian „Ika“ al vagonaro, li alvokas nin humorene sed tamen serioze: Jes, Ika estas vagonaro; la landligoj estas la opej vagonoj, kaj vi, gvidantoj, vi formas la lokomotivon, liverante al ĝi karbojn por la fervoro de viaj ardatantaj koroj; la necesaj akvo kolektota kaj transformota estas la ĝis nun indiferentaj, ne kunlaborantaj katolikoj ĉiulandaj; sed la fairon ni trovas ĉiam en la plej sankta Koro de Jesuo, kaj nia kondukanto estu nia karega S-ta Patro, la gvidanto de la homaro.

Ventega aplaŭdo rekomencis la bonegan paroladon, kaj ne facile estis la tasko de la sekvanta paroladanto, p-ro Lutkie, denove ĉarmi la sekvanta paroladanto, sed ankaŭ li sciis plene interesi nin per sia temo: „Unu ŝafajo kaj unu paŝtisto“, darbagante la pensojn de sia antaŭulo. Lia parolado estis apoteozo de la katolika Eklezio kiel riĝejo de la amo kaj ĝojo kaj certa ejo por feliĝiĝi la nin tiel ardante la feliĉon sopirantan homaron.

Per nia forta deviza kanto „Ni volas Dion!“ ni finis la kunsidon.

Promenado tra la belega Haga Arbardo dum ideala vetero kaj komuna tagmanĝo en „Roomhuis“ unuigis korojn kaj spiritojn en plena harmonio.

La lastaj horoj estis plenigitaj per la pritraktado de multvaloraĵ proponoj de ĉeestantoj rilate al lig-organo, propagando por Esperanto kaj pacmovado, por la disvastiĝado de Esperanto inter la junuloj. Oni elektis S-ron Hans Sappl (München), la prezidanton de la itea kat. Esp. grupo, ĉefo de nova fakto: Internacia Interŝanĝado de Esperanto-Leteroj ktp. inter la Junularo Tutmonda (München, Isabellastr. 40) — por la intereso de la preso, havigo de la necesaj monrimedoj ktp.

Tiam oni elektis la venontan kongres-urbon. D-ro D-ro Meşger invitas al **Graz**, kaj la kongreso ĝoje kaj unuanime akceptas la inviton.

La plej bona venas laste. Je nia surprizo la honor-komitatano S-ro Prof. D-ro Sicking, rektoro de la Kat. Liceo en Hago, elpetas la vorton... Esperant-lingvel! Li, la konata kontraŭulo al nia lingvo! Sed kiu preskribas nian miregon, kiam la inda malnua scienculo konfesas, ke li travivis ĉe ni sian Damasko-horon, ke li fariĝis Paŭlo el Saulo **lernante dum la kongreso (depost Vendredo, do dum tri tagoj!) nian karan lingvon**. Ankoraŭ pli kreskas nia entuziasmo, kiam ni nun, je nia ne-priskribebila ekmiro, atidas tute fluan spiritplenan Esp-skizon, kiu la parolanto, prelegas kun tremantaj manoj, mem kortuŝita interne. Ho, ĉi tiuj minutoj al ĉiu restos ne-forgeseblaj! Oni preskaŭ sukikis lin per pruvaĵoj de dankemo, entuziasmo, admiro!

Facila estas la tasko de nia kara prezidanto en sia finparolado ankoraŭ foje entuziasmiĝi la ĉeestantojn al plena pionirlaboro. Majeste eksonis ree niaj beleĝaj katolikaj himnoj, kaj kun la devizo:

„Ĝis revido en Graz!“

ni forlasis la kongresejon.

M. MIELERT, Breslau X, Worderstr. 38,
Prez. de la Germ. Ligo de Kat. E-istoj,
Vice-Prez. de „Ika“.

Humora Kongres-Kanto

verkita de J. D. APPLEBAUM okazis de la vespermanĝo post la Internacia-Balo sur papera servitio kaj kanifa de la verkinto laŭ la melodio de "Vivu la Verda Sieto!" kun la akompanado de ĉiuj ĉeestantoj.

Denove, amiko, alvenis la tag'
Komenco de nova epoko en Hag'.

Viv' Esperanta vekigis al ni
En bela Holand' en semajn' tiu ĉi.

La pulso de interacia la kor'
Ekbatis kun renoviginta fervor'.

Kaj dankojn por tio ni ŝaldas al vi
Gesamideanoj d' Holanda naci'.

La nomoj de Bruijn, Isbrücker kaj Mees
Fariĝos senmortaj post tiu kongres'.

Kun tiu de Bonn la bon-ega fraŭlin',
Kiuj prizorgis nin kvazaŭ patrin'.

Ĉiujn amikojn en ĉarma Holand'
Ni kronu hodiaŭ per flora girland'.

La belaj festenoj, la bona labor',
Restados por ĉiam en nia memoro.

Kaj tiu memoro la dolĉa de Hag'
Instigu nin iri al urbo de Prag'.

Internacia Esperanto-Servo.

(La traduko kaj la represo en naciaj ĵurnaloj kun aldono de la vortoj "Internacia Esperanto-Servo" estas permesata.)

— Letero el Liverpool. —

Politika Sensacio.

La Angla politika mondo estas nuntempe kvazaŭ bolanta kaldrono, per la paŝo prenita de la laboristoj starigante la tiel nomitan "Konsilantaro de Agado" (Council of Action).

Kiam antaŭ kelka tempo nova milito kontraŭ Rusujo minacis la Anglan horizonton, kelkaj viglaj kaj bonekonataj kondukantoj de la laboristaro formis la suprenomitan Konsilantaron, kaj antaŭ nelonge la Konferenco de la Nacia Laboristara Organizo aprobis unuanime tiun paŝon kiu signifas, ke en okazo de milito kontraŭ Rusujo ĉiuj laboristaj unuiĝoj, kiel unu homo, rifuzos sian laboron al tiu entrepreno.

Estas rimarkinde ke eĉ la plej moderaj kondukantoj el la laboristara movado, kiuj ĉiam kontraŭis "direktan agadon" de la laboristoj por politikaj celoj, nun apogas tiun paŝon kaj decidis ĝin subteni per sia tuta forto.

Opinio pri tiu paŝo de la laboristoj estas dividita inter la diversaj politikistoj kaj ĵurnaloj. Unuj, kune kun la ĉefministro Lloyd George, konsideras ĝin minaco al Demokratio, dum aliaj pensas, ke ĝi jam malfermis la unuan ĉapitron de industria revolucio. En tiu rilato estas interese citi la opinion de la bone konata demokrata ĵurnalo "The Nation" (La Nacio), kiu konsideras ĝin nek unu nek la alia sed vere Angla kaj tute demokrata.

"Estas vere," diras tiu ĵurnalo, "ke la Konsilantaro de Agado estas denoncata kiel eksterparlamentara korpo, sed ekzistas nenio revolucia en eksterparlamentara korpo. La Asocio, kiuj kaŭzis la reformleĝojn en 1832, estis tiutempe konsiderataj kiel organo de revolucio. Sed en la retrospekto ili ludas nur ordinaran rolon en la evoluado de la Brita Liberalismo. Gladstone kaj la alte respektata Duke de Westminster kuniĝis en 1876 por haltigi Britan Ministrin de militdeklaro kontraŭ Rusujo, ĝuste kiel S-ro Smillie ka. S-ro Bevin kuniĝis hodiaŭ!"

La ĵurnalo daŭras argumenti en tiu senco kaj konkludas, ke la laboristaro laŭleĝe havas la rajton rifuzi sian laboron, tute aparte kiam tia grava kaj subita okazaĵo nacia alvenas, kiam forta volo al paco regas inter la nacio kaj la regantoj ne estas sufiĉe fortaj aŭ konsciencaj ĝin plenumi.

J. D. A.

EKLEZIO.

LA KRONADO DE KRISTO JESUO

per

LA LIGO DE LA NOVA ORDONO.

La sekretario de tiu ĉi ligo petis nin publikigi jenon:

Ni havas kiel idealon kaj kiel mision la starigadon de nova, perfekta kaj ĉiam daŭra civilizado — unuverte, la efektivaĵo de la idealo de la Nova Jerusalemo malsupren venanta el ĉielo. Ni serĉas tiun idealon per la grandanima, milda, ĝentila influo de la spirito de Kristo.

La Kronado de Kristo Jesuo interne en la koro kaj ekstere super la regadoj de la nacioj ĉi kaj por ĉiuj estas nia celo.

Estas nia kredo, ke la parolo de Dio sole povas efektiviĝi tian grandan aferon; do ni ofte kantas marŝante:

Parol de Dio, estu vi

Sufiĉa glav por nia band,

Ĝis kiam Nov-Jerusalemo

Vidigas sin en ĉiu land.

Eble vi demandas, kiel ni faros ĝin? Ni ne scias. Kiel eklezio ni esperas vidi la plej mirindan dramon kaj aktulit la plej belegan romanon de ĉiuj jarcentoj; kiel disĉiploj ni serĉas vivojn plenan de intereso, de aventuro, de paco-farado, de danĝeroj sen akcidentoj.

Sufiĉas por ni, ke la nevidebla Gvidanto scias. Nia bano estas la ne-esĉereblaj ricevoj en Kristo. Nij koloroj rememorigas nin pri la Oliveto de la Fido, kie ni atendas la venontan piedon de Tiu, kiu faris per Dia akompano el la tuta tero Galileon de Homamo. La kruco sur la standardo verda signifas por ni, ke el la kruco venas la lumo de la vivo, samtempe la ora koloro rememorigas nin pri la okuloj de nia Estro, kiel flamo de fajro.

Okuloj Diaj, donu Vi

Kuraĝon nun al ĉiu kor,

Ĝis kiam venos ĉiuj ni

Al glora trono de la Sinjor!

La manko de spaco

ankoraŭ ĉiam ĉagrenigas nin. Sole niaj sciencaj kaj literaturaj manuskriptoj jam sufiĉas por pleniĝi tujajn 20 numerojn. Sekve estas neeble publikigi tiujn ĉiujn artikolojn. La ĉiusemajna aperado de ET estas la sola rimedo por forigi tiun ĉi malagrablajn situacion. Tamen, pro teknikaj kaŭzoj, ET ne povos aperi semajne antaŭ Novembro. Bonvolu do pacienciĝi; ni ne forgesos viajn artikolojn, sed konservos ilin por publikigo en estontaj numeroj.

ET n-ro 6 eliros en du semajnoj. Germanaj samideanoj, kiuj povas vendi al ni Germ. poŝtmarkojn po 40, 20 kaj 10 Pfg., bonvolu informi nin, ĉar la poŝtoficejo en Horrem posedas jam nur pm. po 5 Pfg., tiel ke ni devas afranki eksterlandajn leterojn per 16 (!) kaj registritajn eĉ per 32 (!!) poŝtmarkoj po 5 Pfg.

Parolejo.

(Je libera dispono de ĉiuj abonantoj.)

15.

RESPONDO AL ALVOKO POR FERVOJISTOJ.

En Budapeŝto la Landa Societo petis la provan enkondukon de Esperanto ĉe Hungaraj Siatfervojoj. La direkto respondis, ke la peto ne estas plenumbla, ĉar estas sufiĉaj oficistoj, kiuj scias fremdajn lingvojn, kaj Hungarlando estas tro malgranda por komenci tian reformon en eksterlandaj rilatoj. — Do la aliaj pli grandaj landoj devas komenci! (Hungara Esp. Servo.)

14.

PETO AL FERVOJISTOJ.

La "Reichsgewerkschaft Deutscher Eisenbahn-Beamten" (grava Germ. fervojista asocio kun 200000 membroj) sciigis min, ke ĝi volonte akceptas por sia fakrevo interesajn tumondajn novaĵojn fervojistojn, po 10-20 linioj, kaj konsentis aldoni, ke la artikoloj estas tradukitaj el Esp. Mi do plezure akceptis artikolojn ktp. de fremdlandaj s-anoj fervojistaj kaj transigos ilin al la redakcio. Oni elektu interesajn temojn fervojajn (pri salarioj, ekonomiaj situacioj, prezoj en la landoj, strikoj, teknikaj novaĵoj ktp.)

ERNST MUTHSCHALL, Eisenbahn-Zivilsupernumerar, Forst (Lausitz, Germ.)

15.

PRI TAKS-MODERIGO POR ESP. POŝTAĴOJ.

Se la E-istoj pretendas privilegiojn en la internacia poŝto, ili devas pravi, ke — pro la legebleco de la adreso, la videbla malpezo de iliaj poŝtaĵoj, kiuj evitiĝas la laboron pesi — iliaj poŝtaĵoj kaŭzas malpli da dispezoj en la poŝto. Nun ĉi poŝtaĵo estu signata en unu aŭ alia maniero kiel Esperantaĵo. Unue almenau, oni petu abono nur je presoj. Oni certe kontraŭargumentas la ekzamenadon de nefirmaj leteroj kiel aldonon al laboro kaj kosto. Krom tio, tia privilegio kaŭzas la verkadon de leteroj en malbona Esperanto, da kiu jam sufiĉe ekzistas. Presaĵoj portantaj la vortojn "Registritaj kiel Esperantaĵoj" povus esti facile distingitaj inter aliajn. Jam la Usona registaro metis dogan imposton sur Angliajn litaraj vorkaj. Vidu p. 659, Post Office Guide, July 1919 (Angla Poŝtregulano). Oni skribu adresojn en presilitero. La adreso de la sendinto estu en malpli grandaj literoj kaj kiel eble plej malproksima de la alia adreso. Uzante kiel eble plej malpleksajn kovertojn kaj bandedojn el la plej malpeza papero, oni malpligas la koston de spicigado kaj de transporto en ŝipo. Esperantistoj ofte donas aldonan laboron al la poŝtoficiistoj, uzante kiel eble plej multajn poŝtmarkojn disigitajn ambaranke. Tio ne nur ĝenas la slampadon, sed ankaŭ la konstaton, ĉu la poŝtaĵo estas sufiĉe afrankita. Ankaŭ oni memoru, ke la ciferoj same kiel la manskrib-literoj ne estas tute internaciaj. Ekzemple, la ciferojn 1, 7, 9 kaj 4 mi kopias el la Fundamento. Ni E-istoj montru en ĉio bonan ekzemplon! (Ch. G. St.-M., London.)

16.

LOKO AŬ LJOKO? LA FERVORA LABORADO DE LA RUSAJ SAMIDEANOJ EN MERSEBURG.

Mi estas juna Bulgara E-isto veninta antaŭ du monatoj por studi en Halle a. S. (Germ.), kaj mi sentis min devigita viziti ĉiujn samurbajn samideanojn. Tiu ĉi, maljunaj seriozuloj, perfektigis en la lingvo, sed por propagandi ili estas sufiĉe lacigitaj. La junuloj estas okupataj per pli grava afero — skermario!

Veran fervorecon mi trovus en Merseburg. Tie S-ro Selisĉev*) senlace propagandas sian aferon inter siaj kamaradoj en la Rusia Militakademio. Dum unu jaro li gvidis tri kursojn, kaj la nuna estas la kvaraj. La pli multaj de liaj lernantoj estas malkleruloj kaj la multepicacia instruanto devas lernigi ilin unue el la Rusa gramatiko kaj poste el la Esperanta. Oni laboras ĉiutage — matene kaj posttagmeze. La lernantoj, vizitante la kursojn, ne povas labori kaj ĝojni — ili suferas, sed la "ideo" meritis tion. Nokte, kiam aliaj ripozas, la lacigita gvidanto kaj kelkaj el liaj lernantoj-samideanoj priskribas la solan gramatikon en la kvartilo kaj faras gvidantejn pri la lernantoj, ĉar presitaj lernolibroj ne estas. La lasta plenigo estas donata per papero kaj inko, ĉar la "Afero" devas prosperi! Tiel sindoneme, senpage kaj senbrue laboras la kapitulo. Ĉu mi devas lalidegi? Bonvolu fari tion vi, karaj geleantoj, ĉar mi sentas, ke mi ne sufiĉe scipovas la lingvon.

En la interparolado kun "ili" mi rimarkis, ke ĉi tiu dolca prononcado de la litero "ll" malfaciligis la komprenadon kun la tiel ĉeestanta Germana samideano. Mi klarigis al li, ke ĉi tiu mola prononcado estas propra al la Rusoj. Sed la fervoroj montris al mi la manlibron de A. A. Saharov de 1915-a jaro, kiu en § 3, punkto 4 de la prononcado skribas (Ruse): Oni prononcas la literon "ll" mole kiel "l", ekz: la - llo - loko; luko - luko; lupo - lupo; malle - malle.

Mi lernis la lingvon sola, kaj en mia lernolibro ne estas simila regulo. En la Franca lernolibro de S-ro Louis Dufour ĝi ankaŭ ne estas. Ĉu S-ro Saharov eraras aŭ mi ne scias tian regulon? Mi petas je respondo de kompetentaj samideanoj, ĉar mi konvinkigis, ke ĉi tiu diferenco malfaciligas la komprenadon. (At. D. Atanasov.)

*) Kiel ni sciigis, S-ro Selisĉev nun veturis Randonon, kaj la saĝaro perdis sian bonan paŝiston. Supozeble troviĝas inter la malnovaj lernantoj de S-ro S. fervoroj, kiuj daŭrigas sian idealan laboron kaj tenas alie la verdan standardon en sia kvazaŭ-insula estadejo. Rilate la prononcado de "ll" ne ekzistas dubo, ke ĝi estas elparolata kiel simpla sono kaj ne kun mola postsono; ĉar alie oni devus ankaŭ skribi ekz. "lloko" anst. "loko". La eraro en la manlibro estas loma malkomprenebla. — Rim. Red.

Allaj "Paroloj" absentitaj aperos pro manko de spaco nur en la sekvantaj numeroj.

Alvoko

al ĉiuj naciaj societoj!

En Majo Germana Esperanto Asocio forsendis cirkuleron al ĉiuj naciaj societoj pri samtempa sammaniera propagando. La ricevitaj respondoj montris, ke ĉi tiu plano trovis ĉi simpatian. Ni tial proponas jenajn tagojn fiksi por samtempa agado:

- 15. Sept. komerc-komizaj unuiĝoj
- 30. Sept. bank-oficistaj unuiĝoj
- 15. Okt. magistrat-oficistaj unuiĝoj
- 30. Okt. stenografaj unuiĝoj
- 15. Nov. poŝt-oficistaj unuiĝoj
- 30. Nov. polio-oficistaj unuiĝoj
- 15. Dec. fervoj-oficistaj unuiĝoj.

Do, je tiuj destinataj tagoj ĉi Esp. grupo faru en sia urbo al la fakunuiĝo supre nomita peticion, rekomendante la tujan komencan de Esp. kurso kaj dirante, ke la sama propono estas farata je tiu ĉi tago en ĉiuj landoj, celante post kelkaj monatoj doni al la partoprenantoj de la kurso la eblecon intertriatu en unu lingvo kun fakulegaj en la plej diversaj landoj. Certe fia avizo portos la sukceson.

Jen modelteksto, kiun la GEA rekomendas al la Germanaj grupoj:

Al la bankoficista societo en Dresden.

Ni havas la honoron informi vin, ke hodiaŭ en ĉiuj urboj de Britujo, Francujo, Danujo ktp. la Esperantaj grupoj faras peticion al la bankoficistaj grupoj en tiuj landoj, rekomendante la tujan komencan de Esp. kurso. Estas intencate preni post du monatoj intertriaton kun la anoj de la kursoj en la aliaj landoj por doni al la kolegoj okazajn povi korespondi en unu lingvo kun kolegoj en la diversaj landoj.

Vi certe komprenas, ke estas grandvalore kaj alinterese, partopreni en tiu tutmonda unuiĝo de ĉiuj progresmaj kolegoj. Ĉi tiu povas konatiĝi kun fremdaj fakanoj, ekoni fremdajn arangojn, labormetodojn, interŝanĝi komercetojn, poŝtmarkojn kaj spiritan sciencin. Ni estas pretaj aranĝi specialkursojn en via unuiĝo, volonte ni aranĝos ekspozicion por montri la grandan disvastiĝon de Esp. speciale inter la komercistaro. Bonvolu doni informon al Germana Esp. Asocio, Loka Grupo Dresden.

Ni petas la naciajn societojn, kiuj ankoraŭ ne anoncis sian partoprenon, fari tion tuj, por ke ni povu informi pri ĉiuj landoj partoprenantaj. (Ĝis nun partoprenas Britujo, Holando, Danujo, Estonio, Hungarujo, Sioirio kaj kelkaj grupoj en Italujo kaj Ĉeĥoslovakio.) Poste vi enmetu en vian landan ĵurnalon la peton al vial grupoj, fari precize je la nomitaj tagoj la peticion. Per LEA ni publikigos la urbojn, en kiuj okazos la fakkursoj. Konsilinde estas meti en vian ĵurnalon modeltekston, ĉar tio certigas, ke ĉiuj grupoj faros la malgrandan pentadon.

Skribu tuj al Germana Esperanto Asocio, Dresden, Hauptstr. 38.

Alvokoj el Hungarujo.

Bonvolu instigi la *Fremdul-Oficejon de Budapeŝto* (IV, Harisköz 1, Idegengorgalmi), ke ĝi eldonu *gvidlibron* pri Budapeŝto. La direktoro promesis tujan eldonon, se li ricevos sufiĉajn petojn.

Gazetoj, kiuj volas publikigi *bildojn pri Budapeŝto*, ricevas senpage prunte klišojn de la Fremdul-oficejo (Idegengorgalmi) IV, Harisköz 1. Samideanoj, klopodu ĉe vial ilustrataj gazetoj, ke ili petu per vi!

Pro multekostaj poŝtelspezoj ni petas la korespondantojn de malbonvalutaj landoj (Hungarujo, Polujo, Aŭstrujo, lom ankaŭ la slavaj landoj kaj Germanujo), ke ili nepre aldonu respondopuponon, se ili volas respondon. Aŭ ili sendu 1-2 Svis. Fk. aŭ egalvaloran sumon al siaj korespondantoj; tiamaniere dum tuta jaro ili povos interkorespondadi.

Letervesperon aranĝos en oktobro la grupo de Budapeŝto. Bv. sendi leterojn kaj poŝtkartojn al la bibliotekisto: S-ro Jenő Szabó (Budapeŝto, VII, Dohány utca 16, 1.). Bonhavaj samideanoj bonvolu ankaŭ sendi donace libretojn, gazetojn por la biblioteko. Koregan dankon antaŭe por ĉiuj!

Pro la blokado kaj necerteco dumvoje perdis korespondantoj; do ne miru, se vi ne ricevis respondon! Estas konsilinde, ĉion sendi per rekomendita (enkribita) letero! Adresoj de korespondemuloj publikigas la sola Hungara Esperanto-gazeto: "Hungara Esperantisto". (Szege, Szentháromság utca 30. P. Turzo.) Se ĉi tiu ne ricevis sian respondon de la "Hungara Esperanto-Servo" (P. Balkányi) Budapeŝto, petu denove klarigon! — Multaj Hungaroj por nunaj tro altaj afranko-kostoj ĉesigis parton de la korespondado.

Kara Rejnlandano! Kara Vestfaliano!

Ĉu ankoraŭ vi hezitas veturi al Düsseldorf la 19. Septembro? Decidigu tuj! Ekkonsciu, kio dependas de multnombra vizito al nia unua postmilita Revela Kongreso! Montru, ke la militfaroj ne lamigis vian fervoron! Anoncu tuj vian partoprenon en la Revela Kongreso al D-ro C. R. Müller, Düsseldorf, Wagnerstr. 36.